

FLANDRA ESPERANTISTO

MONATA DE VU O

ORGANO DE LA FLANDRA
ESPERANTO
MOVADO

LERNU LEGI. — JOĈJO. — KOMUNIKOJ DE LA ESTRARO. —
LA STUDANTO. — LIBERA TRIBUNO. — NIAJ SOLDATOJ
SKRIBAS. — BIBLIOGRAFIO. — TRA LA ESP-GAZETARO. —
INTER NI. — ANGULO DE LA SERĈEMULO. — DIVERSAĴOJ.

Orgaan van den
VLAAMSCHEN ESPERANTISTENBOND

FLANDRA LIGO ESPERANTISTA
FL. L. E. (Vlaamsche Esperantisten Bond) FL. L. E.

HOOFDBESTUUR :

Voorzitter : Dr. Th. VAN GINDERTAELEN, Stefaniestraat 44, Antwerpen.
Ondervoorzitter : G. BAUMERS, Korte Veldstraat 35, Turnhout.
Secretaris : G. DEBROUWERE, Magdalenastraat 29, Kortrijk (tel. 1654).
Peningmeester : A. DE KEYZER, Vlaamsche Steenweg 70, Brussel.

DIENSTEN :

Boekhandel (F. E. L.) : E. CORTVRIENDT, P. Van Humbeekstraat 3, Brussel-W.
Examens : Dr. F. ROOSE, Guido Gezellelaan 15, Brugge.
Téntonstellingsmateriaal : G. DE BOES, Wijnstraat 81, Ronse.
Voordrachten : A. ACKAERT, Gerardstraat 162, Brussel 4.

ORGAAN :

« Flandra Esperantisto » verschijnt om de maand. — Redactie : Fr. VAN DOOREN, Langstraat 40, Borgerhout. Kopij uiterlijk op 15^{de} van elke maand bij de redactie. — Administratie : A. DE KEYZER, Vlaamsche Steenweg 70, Brussel. Postrekening nr. 2321.50 van Flandra Ligo Esperantista, Brussel. — Barema der advertenties op aanvraag bij de administratie.

BIJDRAGEN :

Leden-abonnten : fr. 25.— 's jaars; gewone bondsleden : fr. 5.— 's jaars.

Flandraj Esperantistoj, via organizo estas :
FLANDRA LIGO ESPERANTISTA!

Flandra Esperanto-Instituto

VENDAS LA PLEJ
BELAJN INSIGNOJN !

JE PREZOJ
PLEJ MALALTAJ !



1 2 3 4
2.50 fr. 3.00 fr. 3.50 fr. 5.00 fr.

(La bildo montras la realan grandecon)

Modelo 1 ekzistas nur kun pinglo kaj speciale taŭgas por ornami kravaton; modeloj 2 kaj 3 ekzistas kun broĉo aŭ butono; modelo 4 ekzistas nur kun broĉo. Ĉiuj insignoj estas unuakvalitaj kaj fabrikitaj el orumita bronzo.

La sekcioj kaj reprezentantoj de Flandra Ligo Esperantista ĝuas 10 %-an rabaton kaj afrankitan sendon.

Aliaj klientoj aldonu 10 % por sendkostoj.

FLANDRA ESPERANTISTO

ORGANO DE FLANDRA LIGO ESPERANTISTA

REDAKCIO : Langstraat 40
Borgerhout ANTWERPEN

ADMINISTRACIO : Vlaamsche Stw. 70
BRUSSEL. P. C. K. : 2321.50 de Fl. L. E.

La redakcio rezervas al si la rajton rifuzi, korekti, mallongigi aŭ iel ajn ŝanĝi la ensenditajn kontribuojn.

Jara kotiz-abono 25 fr.

APERAS MONATE

LERNU LEGI

Nia laboro kaj pacienco
La mondon faros feliĉa.

L. L. Zamenhof.

Antaŭ kelke da tagoj mi ricevis du leterojn de du samideanoj. Ambaŭ petis al mi : « Kiel mi povas perfektigi en la lingvo? ». Kaj al ambaŭ mi respondis : « Lernu legi ».

Per legado oni pliriĉigas la vortrezoron kaj tio estas grava ĉar despli granda la vortprovizo, despli facile oni povas esprimi siajn ideojn. Legante oni ensorbis aŭtomate la gramatikajn terminojn kaj regulojn kaj samtempe elkutimiĝas al la spirito de la lingvo senpene kaj preskaŭ senkonscie; oni lernas sin distrante.

Sed, kion legi?

Mi ne parolos pri la neceso funde legi, eĉ studi, « Fundamenton de Esperanto », « Fundamentan Krestomation » kaj « Lingvajn Respondojn », ĉar mi supozas ke ĉiu Esperantisto inda je tiu nomo jam tralegis ilin kun atento.

Sed poste? Persone mi konsilas ke oni legu nur tion kio plaĉas, ĉar legi prodeve kaj kontraŭguste estas kiel manĝi senapetite : ĝi tute ne efikas, kaj fin-fine naŭzas.

Ne ĉiu havas la emon legi dikajn volumegojn da belliteraturo, kaj preferas simplajn rakontojn aŭ noveletojn, aliaj ŝatas la tradukojn, de l' klasikuloj el la mondliteraturo, iuj eĉ preferas la pli seriozan legaĵon pri scienco, sociologio aŭ religio. Ĉiu legu laŭ sia persona gusto kaj inklinilo, kondiĉe nur ke oni bone legu.

Ekzemple, ne estas konsilinde ekserĉi en la vortaron ĉiufoje kiam oni renkontas novan vorteton, ĉar tio tro ĝenus la glatan sekvadon de la enhavo kaj enuigas. Sed, male, kiam oni troviĝas antaŭ vorto tute nekonata, kiu malhelpas la bonan kompreniĝon de la frazo, oni devas ĝin serĉi, prefere en « Plena Vortaro » kaj ĝin noti en apartan libreton. Same oni faras por ĉiuj nekonataj, strangaj aŭ originalaj esprimoj. Post finlego

de verko oni relegu la faritajn notojn kaj forstrekas nur kiam oni certas ilin bone koni. La notitajn vortojn kaj esprimojn nekomprenitajn oni antaŭmetu al kompetenta samideano el la grupo aŭ, se necese, al la redaktoro de nia lingva rubriko « La Studanto ».

Ĝi diras ke la Esp-libroj estas tro multekostaj kaj ke tial ili ne povas aĉeti ilin.

Mi forte dubas ĉu vere elkora Esperantisto ne povus aĉeti minimume unu libron jare, kiun li, post legado, povus nenomibreblajn fojojn interŝanĝi kun aliaj sekcianoj. Ĉi tie mi volas aldoni ke la Esperantistaro bedaŭrinde ne ankoraŭ konsciiĝis ke la plej bela, la plej taŭga, kaj la plej akceptinta donaco al samidenao estas : Esp-libro.

Cetere, ĉiu serioza Esp-klubo havas (aŭ devus havi) propran bibliotekon, malfeliĉe okazas ofte ke la kun peno aĉetitaj libroj kviete kuŝadas forgesitaj, sub tavolo da polvo en la kluba ŝranko.

Tiurilate gravan respondecon havas la bibliotekisto, ĉar estas lia devo zorgi ke la trezoro sub lia protekto ne restu senfrukta. Tial oni neniam elektu kiel bibliotekiston iun kiu mem ne estas fervora legemulo.

Kaj restas nia revuo.

Kiom da membroj tralegas ĝin kun la necesa atento, kiom da abonanto ne forĵetas ĝin duonlegita?

Multaj sekcioj plendadas ke ili ne scias kiel aranĝi siajn klub-vesperojn, dum ke nia revuo estas neelĉepebla fonto per kiu iniciativulo povas organizi dekojn da interesajn grupkunvenojn.

Kial en la kunvenoj ne debati pri la artikoloj el « Libera Tribuno », kial ne komune pristudi la enhavon de « La Studanto », kiel ne preparoli la rubrikon « Esperanto in de Praktijk » ? Krome, oni povus deklami la poeziaĵojn, laŭtlegi la literaturaĵojn, komune solvi la enigmojn, esplori la enhavon de « Inter Ni », babilu pri « Tra la Esp-gazetaro », preparoli la « Komunikojn de la Estraro », trastudi « Bibliografio-n » kaj eĉ kritiki la ĉefartikolon. Estus interese, estus amuze, kaj estus instrue.

Grupo kiu tiel agas, kulturus ĉe sia membraro la emon legi, kaj instigus al plialtigo de la lingva nivelo; ĝi mem estus la ĉefa profitanto.

Ni Esperantistoj nun havas je nia dispono riĉan literaturon kun miloj da verkojn ĉiuspecaj, ni havas niajn bibliotekojn, ni havas centon da gazetoj kaj revuoj...

Tiun trezoron ni plene eluzu !

Fr. Van Dooren.



ESTRARKUNVENO. — La estraro de Fl. L. E. kunvenis en Antwerpen, la 11-an de februaro 1940, sub prezido de S-ro Van Gindertaelen.

Ĝi pritraktis la situacion rilate al la Ekzamena Komitato, konfirmis la delegitecon de S-anoj Rainson, Van Gindertaelen kaj Roose, kaj aprobis la projektitan regularon.

Fl. L. E.-KONGRESO 1940. — Pere de S-ro Cortvriendt, kiu ĉeestis la kunvenon, estis donitaj al la sekcio Brussel la necesaj instrukcioj por la organizo de dutaga kongreso je Pentekosto. La kongreso-kotizo estos nur 5 fr. Pliaj detaloj aperos venontmonate en Fl. E.

JOĈJO

Ekzerge de la sekva traduko, ni havas la agrablan devon sincere danki S-ron R. Boudry kiu aŭable permesis la Esperantigon de sia pitoreska verketo kaj ĝian preson en « Flandra Esperantisto ».

Estu krome dankeme citataj niaj kompetentaj S-anoj C. Schroyers kaj H. Vermuyten kiuj sindone bonvolis revizii nian tekston : plej ofte iliaj korektoj kaj konsiloj estis aplikitaj sed, ĉar escepte ni preferis propran formon, ili ne povas respondi eventualajn erarojn.

J. FOQUET kaj TEO KEN.

Tiun matenon estis malagraba vetero. Malvarma pluveto gutetis tra la griza nebulo kaj pendigis sur ĉio kiel polvo. Laŭ kotaj stratetoj, inter longaj vicoj da brikaj dometoj, mi paŝis, varme envolvita, al la Maljunulejo. Svarmoj da lernantoj, plaŭdante en la nigra koto, rapide preterkuris min. Ok surdaj batoj venis el la turo kaŝita de la nebulo. Ne rimarkinte tion, mi staris antaŭ la tradicia malnova konstruaĵo, tute el ruĝaj brikoj, kun la blankplastra Nia-Sinjorin-statueto supre de la pordo. Mi suriris la ses granitajn ŝtupojn kaj sonorigis. Frosta malforta sono ruliĝis tra ĉiuj koridoroj, la pordo malfermiĝis, kaj maljuna dika monahino flustre salutis min.

— « Tagon, fratino. » (1).

— « Eniru, sinjoro, » ŝi diris.

— « Fratino, oni diris al mi ke tie mi trovos pripentrindan maljunulon ĉu vere? »

— « Kuniru jam, sinjoro, » kaj ŝi kondukis min en blankan kalkitan ĉambreton, kiu estis ja trioble pli alta al larĝa, kaj kiu odoris medikamentojn.

— « Sidu iom, sinjorino, mi petos la Patrinan permeson. »

La monahino malaperis. Mi aŭdis turnfermi proksime kaj fore kelkajn pordojn, oni ŝoviradis kaj tusadis en la koridoro ĝis finfine la monahino revenis kaj petis sekvi ŝin. Ŝi iris sur siaj molaj pantofloj, dum ŝia rozario kun ja dudek medaletoj balanciĝis laŭlonge de ŝia nigra jupo, kaj sendis sian tintadon ĝis tre malproksime de ni. Ŝi foje returnis sin kaj diris ridetante :

— « La viretoj ĝuste sidas ĉiuj kune, vi povos facile elekti. »

Antaŭ alta duobla pordo ni haltis. « Estas tie, » diris la monahino kaj samtempe ŝi malrapide puŝis la pordon malfermita. Varma, malagraba odoro venis renkonte al ni en la frosteta koridoro. En granda kvadrata salono, en kies mezo kolonforno ronkis ruĝe ardega, la kvardek viretoj estis entenataj. Kvar multe tro altaj fenestroj eĉ ne ebligis vidi la straton de el tiu malgaja ĉambro. Grandaj akveroj fluetis de la vaporplenaj vitroj. Nur kvar sensukaj geranioj apogis siajn sekajn foliojn kontraŭ la vitron, kvazaŭ sopirantaj aeron. Mia unua impresio estis « kompato ». Grandaj, malsanaj dikaj viroj, malgrasaj volvitaj en longaj vestoj, konsumitaj kun larmaj okuloj, mastikkoloraj kun snufnazoj (2), duonblindaj kaj tusantaj. El tiu amaso da homrestaĵoj leviĝis forkuriga odoro.

Duone simplaĉe ili rigardis al mi, kaj sur ĉies vizaĝo mi povis legi : « Kion-tiu faros tie? ». Kelkaj prenis la maĉaĵon el sia buŝo. Maljunul-

(1) Fratino, (ĉef)patrino : uzataj por traduki : zuster, moeder (overste).

(2) Snufi : uzata en la senco pli larĝa de : enflari tabakon. Snufajo estos do : flartabako.

eto, klinante sin preskaŭ ĝistere, diris : « Tagon, sinjoro spektoro » (3), kaj la grupeto kiu kartludis daŭrigis. Ĉe la muroj, sur longaj benkoj, kelkaj sidis tie kaj tie, la mentonon sur sia bastono, kaj fikse rigardadis antaŭ sin, sencele, kun okuloj sensencaj. Du apudaj blinduloj flustris ion kion mi ne komprenis, dum iliaj mortaj okuloj streĉe rigardis ion kion ili ne povis vidi. Mizerolo!...

La monahino flustris : « Elektu ja nun, sinjoro ». Mi vidis tuj ke, aŭdinte tion, ili subite komprenis pri kio temis. Multaj forgesis la respekton kiun ili komence montris al mi. La maljuna kurba vireto remetis sian kaskedon kaj turnis la maĉaĵon inter la vango kaj dentoj, rigardante min kvazaŭdire : « Ha... vi ne estas spektoro! ». Mi ĉirkaŭrigardis en la amason kaj miaj rigardoj hezitis ĉe granda fortika viro proksimume kvardekkvinjara. Bona rideto ŝvebis sur liaj dikaj lipoj. La fratino divenis mian intencon kaj flustris : « Ne tiun, sinjoro, li estas simplaĉa kaj li ekskrementas kie li sidas ». Simplaĉa! Mizerulo! Mi rigardis lin kompateme, kaj li tiel ĝentile responde ridis ke, dum momento, mi demandis al mi mem ĉu ne li estas la plej feliĉa, kaj mi sentis pasi la deziron elekti plu. La fratino interrompis mian pensadon kaj indikis alian maljunuleton.

— « Jen Joĉjo, ŝi diris, li estis jam potretata en la Kadermio. » (4).

Joĉjo, cirkaŭ sesdekjara, kruda malagrabla aspekto, longaj grizaj okulharoj super malvarmaj grizaj okuloj, malpuraj blankaj lipharoj, brunecaj pro snufo, super leporlipo.

— « Ha! jen Joĉjo. »

— « Jes, diris la monahino, malfacile estrebla, sed el ĉiuj li plej bone marŝas. »

Ke li ne estas manprenebla sen gantoj, mi jam rimarkis, lia oblikva rigardo, la sovaĝa frotado al la snufnazo, la kaskedo malrekta sur okulo, ĉio ĉi ne ŝajnis tre ĝentila, kaj la rimarkigo de la fratino konfirmis mian juĝon.

— « Nu, Joĉjo, mi komencis, ĉu vi volus pozi por mi? »

Ne suprenrigardante li respondis bruske : « Tio dependas! »

— « Kiel, Joĉjo? »

— « Nu, sakermenia, li sakris, se la Patrino permesas kaj se vi pagas! »

La fratino igis lin iom pli afabla kaj palpebrumis al mi.

— « Kaj cetere, diris Joĉjo, mi devas ankoraŭ pretigi la litojn. »

— « Kaj je la dekunua, Joĉjo, mi riskis, ĉu vi tiam povas veni? »

La fratino kapjesis kaj postrigardata de tiuj kvardek homruinoj mi forlasis, tre emociita, tiun mucidan kestegon, en kiu tiom da pakita mizero atendis la finiĝon de la savo. Kiam mi estis denove en la pluveto mi enspiris libere kaj provis deĵeti la pezan ŝarĝon kiun la vido de tiuj maljunuletoj premis sur miajn ŝultrojn.

Joĉjo postenis jam je kvarono antaŭ la dekunua. Ne resalutinte, li bruske diris al mi : « Kaj nun? »

— Jes, Joĉjo, eksidu unue, kaj tiam ni ekzamenos la aferon. »

Sidiginte sin li elpoŝigis sian snufajujon, ŝutis kafkulereton da tabako sur sian mandorson, frotis ĉion spiretante en la nazon kaj lipharojn, kaj remontris al mi sian nigran vizaĝon, demandante :

— « Kiom ni perlaboros tie? »

(3) Spektoro : kripligo de inspektoro.

(4) Kadermio : kripligo de Akademio.

— « Nu, Joĉjo, mi respondis, du frankojn kaj duonon po fojo, ĉu sufiĉe? »

Ni interkonsentis, sed la monon mi devis doni al li, ne al la fratino, alie li ne volis pozi.

Tiam mi manovris tiel ke finfine mi ekpentrís. Li sutiĉe taŭge pozis kaj la laboro bone progresis. Ne nur lia malkontentula tipo altiris mian atenton, daŭre liaj bruskaĵoj respondoj igis min pripensi kaj serĉi la kaŭzon de tiu konstanta malkontento. Ĉu en tiu simpla spirito ne kuŝis ŝtono tro malmola, tiel ke ĝi neniam montris momenton da ripozo?

La duan tagon min prenis la deziro foje esplori per kaj tra liaj respondoj, ĉu antaŭe nenio pli bona loĝis en li, kaj kio estis la kruela realo kiu detruis kaj mortigis ĉion. Mi jam estis regalinta Joĉjon kaj delikate kaj paciencie elloginta kelkajn vortojn kiuj certigis al mi ke en lia vivo estis okazintaj aferoj kiuj obstinigis lin.

— « Sed, Joĉjo, kiel vi fartas en la Domo? »

— « Malbone, tonis lia respondo, kaj li forgesis ke li pozas, malbone, ĉimatene mi deziris piedbati la monahinon morta! ». Sur lia vizaĝo aperis, dum momento, kolero bridata.

— « Mi parolis al unu el la maljunaj virinoj, la monahino vidis tion kaj ŝi alkuris. La virino dumvive ne povos plu eliri kaj ankaŭ mi estos punita. »

Mi demandis al li ĉu estas tiel grava delikto.

— « Certe ne, sinjoro, estas tiuj ĵaluzaj monahinaĉoj, sed mi silentu pri tio, mi devus diri tro. »

Mi opiniis ke mi ekscios ion pli sed refoje li respondis :

— « Mi diras ke mi silentu!... kaj li silentis. Mi suspektis historion tre gravan, kaj estis kvazaŭ tiu viro, sidanta tie antaŭ mi, portus en si unu el tiuj dramoj kiuj nerimarkate okazas en la kapoj de la simpluloj sen teatraĵ frazoj aŭ gestoj, sen ĵurnalartikoloj, sen kompatantaj aŭ koncedemaj amikoj, tute simple, forviŝante la belon de la vivo, senplie.

— « Estas tempo, diris Joĉjo, la dekdua kaj duono sonas ». Li levis sin, konsumis ankoraŭ kulereton da snufajo kaj rigardis min kun larmoplenaj okuloj, sed tute alie ol antaŭe. Mi etendis mian manon kaj tute mirigita li prenis ĝin en sian, premis ĝin kaj diris : « Sinjoro, dum ja tridek jaroj mi ne plu donis manon al iu... Ĝis morgaŭ ». Li prenis siajn lignajn ŝuojn en manon por senbrue kaj ne renkontate forlasi la domon.

Kiu evento intervenis en tiu homa vivo, kiu? Kaj kiu ekster mi, en tiuj tridek jaroj, jam suspektis ion? Eble neniu. Neniu jam sentis la koron sangantan tra ĝia malmola konko, neniu jam povis persvadi tiun krudan mizerulon elverŝi la ĉagrenon kiun li tiom longe akumulis! Eble mi ekscios ĝin!

La postan tagon li estis akurata. Li ŝajnis al mi alia homo, aŭ preskaŭ. Li afable salutis min, same malgaje li sidigis sin en sia loko, kaj ni eklaboris. Joĉjo eble sentis ke li havas amikon en mi kaj ke lia tiom longa silento finiĝos. La impulso eligi tion kio streĉas kaj tordas lian koron ja karakterizis Joĉjon, la impulso ĝin svingi plengorĝe al la vizaĝo de la indiferentuloj.

Kiel bolis en mi la deziro scii pli pri la vivo de tiu viro! Kaj mi atendis la okazon reveni sur la vojon kiu kondukos al lia historio. Du tagojn nenio pli estis dirata inter ni. Joĉjo estis ade same afabla. Mi paciencie atendis la momenton.

La trian tagon mi subite demandis al li :

— « Sed Joĉjo, ĉu vi neniam edziĝis? »

Joĉjo ektimis kvazaŭ pafostus ellasata ĉe lia orelo. Li alrigardis min kvazaŭ li volus diri : vi scias ion aŭ vi divenas ĝin. Li silentis kaj enpensiĝis.

— « Jes, Joĉjo, mi riskis, mi suspektas ion... vi ne estis feliĉa dum via vivo. »

Lia snufajujo estis preteksto por ellabori sian dubon : « ĉu li dirus ». Nervoze gestante li prenis snufajon kaj frotis siajn lipharojn tiel nigraj ke du-, trifoje li ternis.

— « Ĉu ne egale al vi scii aŭ ne scii?... »

— « Nu, Joĉjo, se vi preferas silenti... ». Kaj mi komencis labori aŭ, pli ĝuste, faris kvazaŭ.

Malrapide Joĉjo apogis siajn kubutojn sur la genuojn kaj komencis :

— « Sinjoro, je la festo de Sankta Bavo jam tridek kvin jaroj pasis.

Mi amindumis unuafoje, estis kudristino, Merja estis ŝia nomo. Mi estis dudekdu-, ŝi dudekjara. Mi ekkonis ŝin dum ĉevalfoiro kiun ŝi ĉeestis kun sia patrino, vidvino, en vizito ĉe parencoj. Tiun tagon mi iris al la urbo por aĉeti novan trulon. Poste mi iris al la ĉevalfoiro. Ĉe bakajbudo ŝi ĝuste manĝis. Kaj mi, sinjoro, mi volus diri kion mi tiam sentis por ŝi, sed mi ne povas, mi haltis kaj ankaŭ aĉetis kuketojn. Ni parolis vorteton kaj mi akompanis ŝin. Ŝi estis dika granda blondulino, kun paro da okuloj, nigraj kiel karbono, kaj kun korpo tiel sana kaj bela kiel pomo. Tuj mi freneze enamiĝis al ŝi kaj ŝi ŝercis kaj babilis kvazaŭ ŝi konus min jam de cent jaroj. Mi ne sciis diri multon, sed, rigardante ŝin, mi havis mian okupon. Mi akompanis al ŝia patrino, kaj vespere ni kune hejmeniris diligence. Mi sidis ĉe ŝi en malluma angulo kaj serĉis ŝian manon. Mi estis en la ĉielo, sinjoro. Ŝia patrino parolis kun kampulo, kiu ankaŭ revenis de la ĉevalfoiro. La skuado de la diligenco ofte ĵetis nin unu ĉe la alian kaj mi tiam sentis ke mi estas feliĉa. Iom ni babilis malpli kaj manenmane ni skuigadis feliĉaj hejmen sen parolo. Alveninte ĉe « La Cigneto », Merja devis piediri ankoraŭ unu oron kaj duonon, — ŝi loĝis apud la fabriko, — kaj mi kuniris. Estis malluma vespere kaj ventis sufiĉe forte. Mi tiris Merjan tiel proksima al mi ke mia vango estis ĉe ŝia, kaj nekonscie ni tiel tenis nin, kaj, pro feliĉo, ni pereis. Kaj, sinjoro, mi ne plus sciis ke mi vivas kaj tiel sovaĝe mi kisis ŝin pro amo... »

Tie Joĉjo haltis momenton. El liaj akraj okuloj fluis larmoj kaj tra la senhara fendo de lia leporlipo ili ruliĝis en lian buŝon. En li rekreiĝis tiu momento de profunda feliĉo kiun homoj kiaj Joĉjo sentas sed ne povas vortigi. Kaj mi legis en lia tiel aliĝinta vizaĝo ke tra sia doloro li ĝuis, ĝuis... Mi lasis lin satplori kaj post paŭzeto, li reparolis :

— « Mi kuniris ĝis ŝia pordo kaj diris : « Ĝis morgaŭ », ankoraŭ foje mi ĉirkaŭbrakis ŝin kaj ankoraŭfoje ni amis unu la alian... De interne ŝia patrino vokis : « Merja, mi jam enlitiĝis », kaj refoje kaj refoje mi kisis ŝin... Tiun nokton mi ne iris hejmen por dormi. Estis ekpluvinte kaj mi rifuĝis en ŝafistkabanon, sidigis min kaj, plena de feliĉo, endormiĝis. Mi sonĝis pri Merja, tiel bela, sed tiel bela, kvazaŭ mi maldormus. Ŝi estis mia edzino kaj mi donis al ŝi orajn kisojn en ŝiaj oraj haroj, kaj miaj brakoj ne estis sufiĉe longaj por premi ŝin en ilin. La postan tagon, la ŝafisto vekis min je la kvara kaj duono, kaj feliĉa, kontenta, ne manĝinta, mi iris labori per mia nova trulo, kaj mi kantis la tutan tagon... »

Tie Joĉjo forgesis unuafoje sian suferon kaj en liaj akraj okuloj ree brilis la lumo de antaŭ tridek kvin jaroj. Sed tiu momenteto daŭris tiom mallonge ke ne eblis esprimi mian respekton al tiu tiel meritita feliĉo. Liaj okuloj iĝis denove ŝtonaj kaj denove lia lipo deformiĝis pro la falto kutima jam de tridek kvin jaroj.

— « Sinjoro, mia feliĉo daŭris nur unu monaton... » kaj kvazaŭ enpense li aldonis : « Ŝi estis tro bela, Merja... Merja... kial? »

« Jes, sinjoro, daŭris nur mallongan tempon. Ĵun dimanĉon posttagmezon, neniam mi forgesos, mi denove vizitis ŝin. Mi kunportis belan pompaduran ŝalon de dudek frankoj kaj denove deziris esti sola kun ŝi. Kaj ne kredu, sinjoro, ke, inter ni, io pli okazis ol la unuan vesperon. Ne, mi ĵuras tion, por mi ŝi estis tro bela kaj mi estus bedaŭrinta rakonti al ŝi pri tiuj aferoj. Por mi ŝi estis Virgulino Mario. Sed neniu en la mondo povis ami ŝin pli ol mi... ». Kaj li sonĝis kvazaŭ laŭtvoĉe : « Pli ol sidi kune sur la benko ĉe la kaprostalo sub la jasmenoj, kun ŝi ĉe mia koro kaj miaj lipoj en ŝiaj blondaj haroj, pli mi ja el la fundo de mia koro ne deziris... Sed ŝi estis tro bela, sinjoro, ŝi estis tro por mi... »

Dikaj larmoj ruliĝis sur lia sekva vizaĝo.

— « Mi ne sciis, sinjoro, ke mi ankoraŭ povas plori ». Per mandorso li viŝis du larmojn for de sia kruda vizaĝo. « Tiu tempo, tiu bela tempo ne daŭris longe. Tiun posttagmezon, estis en februaro, mi denove vizitis ŝin kaj aĉetis ŝalon por ŝi. Ĉe la fenestro ŝi legis « La Tagaj(n) Novaĵoj(n) », kaj Ameli, ŝia patrino, okupis sin en la ĝardeno. Mi salutis ŝin de ekstere, saltis enen kaj kaptis ŝin en miajn brakojn. Multon mi ne diris. Estis strange, estante kun ŝi, mi preskaŭ ne sciis paroli. Ameli envenis kaj post : Tagon, Joĉjo, ŝi ĉetabligis sin kaj kartaŭguradis. Ni sidis kune kaj malfermis la paketon. Kiel ŝi rigardis! Kaj en sia ĝojo ŝi ĵetis la ŝalon ĉirkaŭ mian kolon kaj tiris mian vizaĝon ĉe sian. Senti ŝin ĉe ŝiaj ruĝaj vangoj havigis tiom da plezuro al mi ke ne plu sciis kie mi estas... Kaj tiam... ». Denove li ŝajnis vekigi el inkubo... « Kaj tiam tio okazis kio detruis mian vivon... tiam ekis la tridek kvin jaroj de ĉagreno, tiam komencis por mi la infero kun ĉiuj malbenoj kiujn nia Disinjoro sendis sur min. Tiam pasis antaŭ la fenestro viro kiun mi ne konis, sed tiom proksime al ĝi ke mi ĉion observis. Ankaŭ Merja vidis lin, mi opiniis. Ni residis, sed estis kvazaŭ ĉio estus ŝanĝiĝinta. En la okuloj de Merja mi legis mistereton, ŝi ne parolis plu, kaj kvaronhoron poste ŝi diris ke ŝi devas iri eksteren. Ŝi iris eksteren, kaj estis kvazaŭ io estus okazinta, sed mi ne sciis klarigi tion al mi. Mi sidigis min ĉe Ameli kaj rigardis al ŝia kartaŭguro. « Mi ĝuste esploras vian sorton, Joĉjo », ŝi diris. « Kaj? », mi demandis. « Nenio kio taŭgas, ĉagreno, la nigraj reĝoj... » kaj multe pli, kion mi forgesis.

« Merja restadis for kaj mi malkvietiĝis ». « Ameli, mi diris, ĉu vi ne trovas ke Merja estas tiom longe for? ». — « Iru foje vidi, Joĉjo », ŝi diris kaj mi iris vidi. Ĉie mi serĉis, en la domo, en la bakfornejo, mi vokis, kaj neniu respondis... Kiel kuglo tiu viro penetris en mian memoron, kaj mi pensis pri tiu malvarmo de Merja kiam ŝi kisis min... Jes, estis li, ne eblis alie. Mi iĝis rabia pro kolerio, kaj spite ĉion, volis trovi Merjan. Mia kapo estis kiel fajro. Silente mi aŭskultis ĉie, mi aŭskultis en la kaprostalo, kaj supre de la kaprostalo estis la fojnejo, mi aŭskultis atentege kaj... mi aŭdis kraketon. Jam krepuskis, mi serĉis kiel supren, kaj per peco de ŝtupareto kiu staris tie ĝuste preta, mi grimpis sur la fojnejon.

Robert Boudry. (Daŭrigota.)



Korespondajoj sendu al la redakcio : Stefaniestraat 44, Antwerpen.

NOVA KONATIĜO.

Eĉ nia « Flandra Studento », kiom ajn ĝi senkulpas, suferas sekve de la milita konjunkturo; sed ne utilas esprimi kaj ripeti sian bedaŭron, oni devas fari pli ol lamentadi kaj, antaŭ ĉio, zorgi ke la komencita laboro estu daŭrigata. Cetere, post kelkaj semajnoj, la Esperanto-Ekzamena Komitato ekiunkcios en Flandrujo : pli ol iam niaj legantoj bezonos helpon kaj konsilon, pli ol iam ili deziras disponi pri ekzercoj kaj prepara materialo. Tiu ĉi rubriko estas do tute nemalhavebla kaj ne malaperos.

Anstataŭante du kompetentajn antaŭulojn — kiuj pro siaj pioniraj kaj sukcesaj klopodoj indas la plej sinceran dankadon — mi neniel intencas ŝanĝi iliajn celon kaj metodon kiu estis : « produkti » Esperantistojn raciajn, taŭge instruitajn kaj kapablajn fruktodone partopreni la Movadon; mi eĉ dezirus akcenti ilian sintenon ! Sed, kiam la principo restas identa, tamen la realigo devas iomete diferi : pro amplekso malpli granda, la enhavo estos memkompreneble reduktita... kaj, vi facile imagas tion, du mizeraj paĝetoj ne povas enteni multon !

La plej grava leĝo — obei leĝon estas ĉiam malagrable — estos do : koncizeco, nepra koncizeco. Malgraŭ tiu sufiĉe ĝena limigo, mi ade strebos al la plej traŭta, la plej kompleta disvolvo de la pritraktata punkto, almenaŭ en la kadro de ĝenerala plano, kiun mi ordinare sekvos kaj kiu mi sube skizas :

- I) Artikoleto pri lingva detalo, gramatika malfacilaĵo, stila eraro k.s.
- II) Ekzercoj por komencantoj (A), progresantoj (B), por ĉiuj (C).
- III) Eventualaj respondoj de la redakcio.

Finante, ĉar mi ne forgesis la leĝon, mi esprimas la deziron ke la legantoj, per siaj demandoj, rimarkigoj kaj ensendaĵoj, plej ofte mem verku tiun ĉi rubrikon; aliflanke mi promesas fari ĉion eblan por precize informi la demandantojn kaj plenumi iliajn sugestojn. Tiel, dank' al nia lojala kunlaboro, « Flandra Studento » vivos vivon sendube bridatan, sed ne malpli viglan, ne malpli interesan ol antaŭe. T. V. G.

I.

Granda litero.

Ankaŭ tiu problemo aspektas tre elementa; ni skize konsideras ĝin kaj solvos ĝin en kelkaj linioj. Granda litero (majusklo) signas :

- a) La komencan vorton de frazo : La viro malsaniĝis. Hajlas. Mensogi estas virine.
- b) La proprajn nomojn : Antverpeno, Flandrujo, Marta.
- c) La gravajn vortojn de titolo aŭ surskribo : Restoracio « La Cigneto », Literaturo Mondo.
- d) La komencan vorton de verso :

La am' ne estas ludo,	Ĝi svingas sian vipon,
Sed forta sorta trudo,	Al lip' pelante lipon.

(Kolocsay).

NOTO : La fontoj de la ekzercoj estos eventuale indikitaj kun la korektoj.

e) La alparolajn titolojn : Lia Ministra Moŝto, Lia Advokata Moŝto. Ni aldone substrekas ke nek la nomo de tago (merkredo), nek la nomo de monato (decembro), nek la adjektivoj derivitaj de propra nomo (li naskiĝis en angla vilaĝeto) postulas la uzadon de granda litero.

II.

A) Por komencantoj : Traduku en la flandran.

a) Tri musoj.

Superstiĉa princo vidis foje en sonĝo tri musojn : grasan, malgrasan kaj blindan. La princo venigis diveniston, kiu klarigis la sonĝon jene : « La grasa muso estas via ministro, la malgrasa estas via popolo, kaj la blinda estas via portreto, mia princo. »

b) Kvin aŭ sep.

Iu kamparano, aĉetinte en la urbo ses azenojn, kondukis ilin hejmen. Survoje li sidiĝis sur unu el ili kaj la ceteraj kvin kuris antaŭ li. Rajdante li kalkulis : « Unu, du, tri, kvar, kvin... kio estas tio? Mi ja ses azenojn aĉetis kaj kial mi vidas nur kvin? »

Li denove kalkulis la antaŭkurantajn azenojn kaj ĝuste la sesa perdiĝis. Rajdante li pensis pri la malbona ŝtelisto. Apud sia domo li haltis. La edzino aŭskultis la okazintaĵon, poste ŝi diris : « Trankviliĝu, mia saĝa edzo, vi vidas nur kvin azenojn, sed mi vidas sep. »

B) Por progresantoj : Esperantigu.

Vadertje Musset (el « Oorlogsnovellen » de E. Claes).

Nu zal ik U vertellen hoe vadertje Musset van Cernay-en-Dormois aan zijn eind is gekomen, zoo droevig aan zijn eind is gekomen, in 't krijgsgevangenenkamp van Erfurt.

Hij was vijf-en-zestig, en naar hier gebracht met zijn kleinzoontje van elf jaar, met den ouden Collot, en met vele anderen uit zijn dorp. Zij wisten niet waarom, maar toen ze hier waren noemden de Duitschers hen « Francs-Tireurs ».

Vadertje Musset kondt ge elken dag tusschen de barakken zien rondslechteren met zijn kleinzoon, Jules Musset, « son petit gas », aan de hand, elken dag wat ouder en magerder, elken dag wat meer gebogen en ellendiger. Zijn armelijke kleeren hingen hem slodderig om zijn uitgeteerde lichaam, vuil en verhakkeld, zijn muts was diep over zijn voorhoofd getrokken, zijn schoenen waren langs onder heelemaal door-gesleten, en hij duwde er elken ochtend wat stroo in om de nattigheid niet te zeer te voelen. Zoo zag ik hem bijna iederen dag langs me voorbijgaan, de oogen naar den grond gericht, met zijn ingevallen gezicht, met soms een verloren blik voor zich, naar een ongekende verte, en pratend met zijn « petit gas », dien hij bij de hand hield.

C) Por ĉiuj : Kiel ni tradukos la jenajn esprimojn ?

- | | |
|------------------------------------|----------------------------|
| De eerste de beste. | Korte metten maken. |
| Mijn hart is droefgeestig gestemd. | Moord en brand schreeuwen. |
| Ingenomen zijn met zich zelf. | Opwegen tegen iets. |
| De kaart leggen. | Met raad en daad. |
| Het loopende jaar. | Studeeren in de Rechten. |
| Naar men zegt... | Verliefd worden op... |



La artikoloj, pri kiuj respondecas nur la verkintoj, povas esti subskribitaj per pseŭdonimo, sed la sendinto devas konatigi sian nomon al la redakcio. La artikoloj estu kiel eble trafa kaj koncise verkitaj.

ANKORAŬ PRI LA EVOLUO DE ESPERANTO.

Responde al la artikoloj « Kien Esperanto » de nia s-ano Van Dooren kaj « Respondo de Demokrato » de H. d. R., mi ĉi tie konatigas artikolon de d-ro Zamenhof, kiu plene solvas la tutan problemon. Bedaŭrinde la Esperantistaro ne ĉiam atentis la saĝacajn vortojn de nia Majstro.

« Por ke la lingvo internacia povu bone kaj regule progresi kaj por ke ĝi havu plenan certecon, ke ĝi neniam disfalos kaj ia facilanima paŝo de ĝiaj amikoj estontaj ne detruos la laborojn de ĝiaj amikoj estintaj, — estas plej necesa antaŭ ĉio unu kondiĉo : la ekzistado de klare difinita, neniam tuŝebla kaj neniam ŝanĝebla Fundamento de la lingvo. Neniu persono kaj neniu societo devas havi la rajton arbitre fari en nia Fundamento iun eĉ plej malgrandan ŝanĝon ! Tiun ĉi tre gravan principon la Esperantistoj volu ĉiam bone memori kaj kontraŭ la ektuŝo de tiu ĉi principo ili volu ĉiam energie batali, ĉar la momento, en kiu ni ektuŝus tiun principon, estus komenco de morto.

Laŭ silenta interkonsento de iuj Esperantistoj jam de tre longa tempo la sekvantaj tri verkoj estas rigardataj kiel fundamento de Esperanto :

1. La 16-regula gramatiko;
2. La « Universala Vortaro »;
3. La « Ekzercaro ».

Tiujn ĉi tri verkoj la aŭtoro de Esperanto rigardadis ĉiam kiel leĝojn por li kaj malgraŭ oftaj tentoj kaj delogoj li neniam permesis al si (almenaŭ konscie) eĉ la plej malgrandan pekon kontraŭ tiuj ĉi leĝoj; li esperas, ke pro la bono de nia afero ankaŭ ĉiuj aliaj Esperantistoj ĉiam rigardados tiujn ĉi verkojn kiel la solan.

Tial, por meti finon al ĉiuj malkompreniĝoj kaj disputoj, kaj por ke ĉiu Esperantisto sciu tute klare, per kio li devas en ĉio sin gvidi, la aŭtoro de Esperanto decidis nun eldoni en formo de unu libro tiujn tri verkojn, kiuj laŭ silenta interkonsento de ĉiuj esperantistoj jam de longe fariĝis fundamento por Esperanto, kaj li petas, ke la okuloj de ĉiuj Esperantistoj estu ĉiam turnataj ne al li, sed al tiu ĉi libro.

Ĝis la tempo, kiam ia por ĉiuj aŭtoritata kaj nedisputebla institucio decidus alie, ĉio, kio troviĝas en tiu ĉi libro, devas esti rigardata kiel deviga por ĉiuj; ĉio, kio estas kontraŭ tiu ĉi libro, devas esti regardata kiel malbona, se ĝi eĉ apartenus al la plumo de la aŭtoro de Esperanto mem. Nur la supre nomitaj tri verkoj publikigitaj en la libro « Fundamento de Esperanto », devas esti rigardataj kiel oficialaj; ĉio alia, kion mi verkis aŭ verkis, konsilas, korektas, aprobas ktp., estas nur verkoj privataj, kiujn la Esperantistoj — se ili trovas tion ĉi utila por la unueco de nia afero — povas rigardadi kiel modela, sed ne kiel deviga.

Havante la karakteron de fundamento, la tri verkoj represitaj en tiu

ĉi libro devas antaŭ ĉio esti netuŝeblaj. Tial la legantoj ne miru, ke ili trovos en la nacia traduko de diversaj vortoj en tiu ĉi libro (precipe en la angla parto), tute nekorektite tiujn samajn erarojn, kiuj sin trovis en la unua eldono de la « Universala Vortaro ». Mi permesis al mi nur korekti la preerarojn; sed se ia vorto estis erare aŭ nelerte tradukita, mi ĝin lasis en tiu ĉi libro tute senŝanĝe; ĉar se mi volus plibonigi, tio ĉi jam estus ŝanĝo, kiu povus kaŭzi disputojn kaj kiu en verko fundamenta ne povas esti tolerata. La fundamento devas resti severe netuŝebla eĉ kune kun siaj eraroj. La erareco en la nacia traduko de tiu aŭ alia vorto ne prezentas grandan malfeliĉon, ĉar komparante la kuntekstan tradukon en la aliaj lingvoj, oni facile trovos la veran sencan de ĉiu vorto; sed senkompare pli grandan danĝeron prezentus la ŝanĝado de la traduko de ia vorto, ĉar, perdinte la severan netuŝeblecon, la verko perdis sian eksterordinare necesan karakteron de dogma fundamenteco, kaj, trovante en unu eldono alian tradukon ol en alia, la uzanto ne havus la certecon, ke mi morgaŭ ne faros ian alian ŝanĝon, kaj li perdis sian konfidon kaj apagon. Al ĉiu, kiu montros al mi ian nebonan esprimon en la Fundamenta libro, mi respondos trankvile : « Jes, ĝi estas eraro, sed ĝi devas resti netuŝebla, ĉar ĝi apartenas al la fundamenta dokumento, en kiu neniu havas la rajton fari ian ŝanĝon ».

NIAJ SOLDATOJ SKRIBAS...

Plej karaj samideanoj,

De « ie en Belgujo » mi skribas ĉi tiujn liniojn al vi. For de la hejmo, for de la konatoj, for de ĉio kion ni amas, ni nun estas en malproksima kantonmento. Kun iom da malĝojo kaj iom da nostalgio ni revas pri la paca estinteco, kaj tiam ni, soldatoj, ni kiuj devas defendi nian landeton kontraŭ ĉiu atako, ni kondukas kiel infanoj.

Sed ne ĉiam ni estas tiel malgajaj. Ofte kun brua amuzemo ni provas forgesi nian malfeliĉon. Ni rakontas, ŝercas, kartludoas, kantas kaj trinkas...

Inter la mobilizitoj ankaŭ troviĝas Esperantistoj, kaj kiam du samideanoj renkontiĝas, ili estas tiel feliĉaj, kvazaŭ ili trovis perditan fraton. Tiam ili parolas pri la antaŭa vivo, ili rakontas pri sia Esp-kublo, pri la grupa vivo kaj denove ili retrovas iom de sia optimismo.

Kaj ofte ili interparolas pri la neceso de internacia lingvo, ĉar ni scias ke ni, Esperantistoj, posedas la ŝlosilon kiu povus malfermi la trezoron de la internacia interkompreniĝo.

Mi klopodas, ĉie kie estas eble, konvinki miajn kunsortanojn pri la neceso lerni nian lingvon kaj, kiam mi sukcesas, mi estas ege feliĉa, kaj jam vidas, en miaj revoj, amason da novaj samideanoj, novaj kunhelpantoj por nia pacama celo... **Infanteriano.**

Karaj amikoj,

Mi multe dankas por la bela promeso daŭre sendi Fl. E. al ni, mobilizitoj. Nia revuo estas nia sola kontakto kun nia organizaĵo...

Mi fieras diri ke mi sukcesis kapti la intereson de soldato el mia kompanio por Esperanto. En niaj liberaj horoj mi instruas al li nian lingvon. Tre kuraĝige por mi estas ke mia lernanto bone progresas...

...Mi esperas ke la amikoj hejme ĉiuj daŭrigas labori por nia afero kaj ke nia afero ne tro suferis pro la nunaj cirkonstancoj...

Verdstelano.



bibliografio

Duope ricevatajn verkojn ni recenzas, unuope ricevatajn ni nur mencias. Verkoj, senditaj al aliaj adresoj ol la redakciadministracio aŭ Flandra-Esperanto-Instituto estos ignorataj.

V. Korolenko. **LA SENLINGVULO.** Tradukis el la rusa lingvo M. Sidlovskaja. Eldonis : Libro-servo de la Federacio de Laboristaj Esperantistoj en la regiono de la nederlanda lingvo. Postbus 4050. Amsterdam-Oost, kaj Sennacieca Asocio Tutmonda, Westerbeekstraat 57, Rotterdam-Z. — Prezo : broŝ. fl. 1.50, tolbind. fl. 1.90.

Per la grandaj majstroj el la rusa literaturo, i. a. Tolstoj, Gorki, k.t.p., ni konatiĝis kun la vivo de la rusaj kamparanoj; ili profunde detalis la animon de tiuj sklavoj de la tero. En « La Senlingvulo », Korolenko montras al ni alian aspekton de tiuj homoj. Li priskribas la elmigrantojn, tiun klason de mizeruloj, kiu forpelita de sia gepatra kamparo pro malsato kaj subpremado, revas pri libereco kaj feliĉo. Antaŭ kelkaj jaroj, oni ankoraŭ povis vidi ilin, malpurajn kaj strange vestitajn, amasigitajn en la grandaj havenoj, de kie ili estis dissemataj tra la tuta mondo, precipe Ameriko. La nesciado de ĉi mondlingvo estis grava malhelpo, kaj multaj inter ili malsukcesis kaj pereis sur la vojo al la libereco. La verkisto donas al ni klaran bildon de tia vivo :

« El la kvietaj vilaĝoj Loziŝĉi, forveturas Amerikon Anna Lozinski por trovi sian edzon, kiu vokis ŝin. Ŝia frato, la altkreska kaj bonkora Mateo, kaj ties amiko Dima, allogitaj per la vorto « Libereco » — kies sencon ili eĉ ne komprenas, — decidis akompani la junan virinon.

Apenaŭ ekster la hejmlando, la elmigrantoj renkontas malhelpojn. En Hamburgo, la nesciado de la germana lingvo kaŭzas miskomprenon pro kio nur Anna estas ensipigita. Mateo neniam revidos sian fratino...

La du viroj trovas alian ŝipon kaj post emocia marveturado, dum kiu Mateo konatiĝis kun Anna, elmigrantino, la statuego de la Libereco aperas.

Terurigite pro la nov-jorkaj novaĵoj, kiuj aspektas al ili kiel satanaĵoj eltrovaĵoj, ili estas feliĉaj renkontante rusan hebreon, kiu ofertas sian propran loĝejon.

Ĉiun tagon postlasinte Anna-n ĉe ŝia mastrino, Mateo perdiĝas en la urbejo. Senlingvulo li estas, senhelpulo li iĝas. Neniu lin komprenas : li estas mutulo inter surduloj... Finfine li trovas rifuĝejon en arbeto.

Frumatene li levigās. Li renkontas amason da senlaboruloj, kiu sin direktas al mitingo; li sin enmiksas. En Mateo naskiĝas stranga sento, kiun li komprenas : la amaso al li plaĉas. Li ankaŭ komprenas ke la oratoro de la mitingo parolas pri li, pri tiuj, kiuj, mizeruloj kaj senlingvuloj kiel li, ĉirkaŭas lin. Lia animo estas ekscitita. Kvazaŭ ebria, li trapiŝiĝas antaŭen por atingi la oratoron... sed policano, miskomprenante la geston de Mateo, forte frapas lin. Al Mateo, tiu neatendita doloro memorigas ĉion, kion li jam suferis en tiu-ĉi nova lando, kaj kvazaŭ furioza urso, li suprenlevas la policanon kaj jetas lin teren, meze de la amaso.

Tiam venas la fuĝo, for de la leĝo, al malproksima urbeteto... Ĉio finiĝas bone kaj post du jaroj, alligita Mateo revenas en Nov-Jorko por kunpreni Anna-n, kiu lin atendis... »

Ĉu necesas aldoni ke la stilo de la tradukintino estas facila kaj klara? « La Senlingvulo » ne estas la unua pruvo de ŝia talento. Tiukaze kritiko estus aroganta.

La kontrolo de la Literatura Komitato de F. L. E. garantias ke la nekorektaĵoj kaj la gramatikaj eraretoj, kiujn ĝi ne volis ŝanĝi, ne ĝenas la legadon.


Cetere la libro allogas per siaj klara litertipo kaj la tipografie prizorgita laboro.

H.

DER GROSSVATER UNSERER FAMILIE. 8-paĝa broŝuro eldonita de « Internaciano de Militrezistantoj », ilustrita. Senpage havebla ĉe I. d. M., 11 Abbey Road, Enfield, Middlesex, Anglujo.

En ĝi estas Esp-lingve priskribita (ni ne konas la kialon de la germanlingva titolo), la sorto de kelkaj « amikoj » kiuj estas helpitaj de la organizaĵo. La broŝuro estas alvoko al ĉiuj pacamaj homoj por helpi. Financan helpon oni povas sendi al supremenciata adreso.

PAX, Gazetje voor Volksontwikkeling voor Oolen en omgeving maakt propaganda voor Esperanto en drukte een proefles in zijn laatste nummer. Verder richt het een schriftelijke cursus in. Adres : « Pax », Steenweg op Noorderwijk 160, Oolen.



ESPERANTO KAJ LA MILITO.

ESPERANTO (U. E. A.). — Kiom da bono estus plenumebla, se ne estus okazinta la disiĝo de la movado en 1936! La tempo pravigis la homojn, kiuj en 1936 kontraŭstaris abruptan ŝanĝon sen serioza esploro de faktoj kaj realaĵoj. Hodiaŭ la pasinto jam ne interesas plu. Novaj problemoj sin prezentas kaj postulas solvon. Kaj por bone solvi ilin, necesas ke malaperu la skismo, ke efektiviĝu la vera unueco.

ESPERANTO INTERNACIA (I. E. L.). — Fine, ne forgesu ke la milito montras pli ol io alia la neceson por internacia lingvo, kaj nur Esperanto estas preta plenumi tiun rolon. Ĝia sukceso en tiu rolo do dependas plejparte de la Esperantistoj mem. Se ili daŭrigos la laboron kaj ne perdos la kuragon, la sukceso sopirata dum tiom da tempo estas certa.

HELENA ESPERANTISTO (Grekujo). — Ekzakte, kiel la mizero servas por provi la koron, kaj la fajro por provi la oron, tiel ankaŭ la kontraŭaĵo de la nuna militesplodo, eĉ si ĝi malhelpas por kelka tempo la rapidan progreson de nia homaroma movado, je la fino, kaj tuj post la kvietigo de l'uragano, ekaperos por ĉiuj sen-nuba ĉielo stelluma kun serena vetero. Tiam Esperanto, ĉu kiel alta ideologio, ĉu kiel interpopola kaj interfratiga interkomunikilo, elmontriĝos vere grava faktoro, preta por cementi per forta solidareco la tiel kruele provitan homaron. Ĝis tiu feliĉa momento, kiun, ĉiuj Esperantistoj senescepte bondeziras, kiel eble plej baldaŭa, ni ne perdu nian tempon krucigante la manojn sur la bruston kaj nenion farante, sed ĉiu el ni agu laŭpove por pretigi tiun favoran grundon uzebla en oportuna tempo.

SENNACIULO (S. A. T.). — Niaj perspektivoj estas sufiĉe mallumaj. Povas esti, ke pli bona tempo estas pli proksima ol ni supozas, sed tamen, ni havas la militon, kaj eble sangajn reformojn antaŭ ni; necesas do unue travivi tion. Kaj ĉiu povas kompreni, ke la estonto grandparte dependas de niaj agoj en tiu ĉi periodo, kiun ni povas konsideri transira periodo. Estas do kaŭzo esti ĝojaj pro tio, ke ni ankoraŭ iel povas daŭrigi la kulturalan laboron...

LIGILO (Ĉeĥo-Moravujo). — La granda batalo, dum kiu ni vivas kaj dum kiu nia modesta revuo aperas, signifas komencon de konstruado de nova ordo politika kaj socia. Ni volonte adaptiĝas al novaj kondiĉoj. Tuj ĉe l' komenco de la milito ni kaj ĉiuj niaj membroj ĉesigis ĉiajn rilatojn kun Esperantistoj el malamikaj landoj. Ni limigis nian agadon al konservado de scio de la lingvo. Ĉar ni trovas utile, ke scio de Esperanto inter ĉeĥoj ne malgrandiĝu. Ni estas firme konvinkitaj, ke ĝi daŭre estas kaj estos tre utila ilo por servi al ĉeĥoj ankaŭ en ilia nova ŝtatjura situacio. Tial ni daŭrigos eldonadon de la Ligilo.

LA SUDA STELO (Jugoslavujo). — Oni devas al la tuta mondo ekkrii la devizaĵojn : « For la bataliloj ! », « Por la homaj buĉejoj ! ». Ni ne devas aparte substreki, ke ni Esperantistoj devas esti en la unuaj vicoj en tiu porpaca laboro, kiel ĉiam estis ankaŭ D-ro Zamenhof, kiu dediĉis la tutan sian vivon por tiu celo.

HEROLDO (I. E. L.). — La laboroj kaj oferoj de l' pioniroj ne estos vanaj. Por tio zorgos ni, vivantoj, kaj tiuj kiuj venos post ni. La ideo de lingvo internacia, la ideo de tuthomara interkompreniĝo, lingva kaj kora, ne pereos eĉ en la marĉo kaj flamoj de l' nuna milito.

LA JUNA VIVO (T. J. O.). — Laŭ la raportoj montriĝis, ke nek en Francujo, nek en Anglujo povos okazi nia ĉiujara, internacia junularkunveno pro la nuna malfavora internacia situacio. Tial la estraro decidis, ke la internacia junularkunveno 1940 okazos en la centro de Nederlando, dum aŭgusto.



AALST. — Pioniro. — Pioniro aranĝis intiman kunestadon, la 24an de januaro, en nia ejo, « De Koornbloem ».

Post malgranda vespermanĝo, ni kantis Esperantajn kantojn kaj ni amuzis nin per diversaj ludoj.

Ni kontraŭkore disiĝis je nokmezo.



INTERNACIA KONKURSO POR LA JUNULARO.

La Internacia Kristana Junulara Komisiono organizas la kvaran fojon internacian konkurson, dank' al S-ino Anna F. G. van Loan al Usono, kiu memore de sia edzo starigis fondadojn por plivastigi la spiriton de internacia amikeco kaj kompreno inter la junularo.

En la kadro de la ĝenerala temo : « Kristo kaj la Universala Frateco » la konkurantoj devos pritrakti la temon jene :

a) Gejunuletoj (Juniors) : Komentarii « Miha », ĉapitro 4 v. 1-5.

b) Gejunuloj (Seniors) : « Kiel rekonstrui mondon de fratamo, kie la milito estos forigita? »

Oni rekompencos la plej bonajn verkajojn per la sekvantaj premioj :

a) Gejunuloj (Juniors) :

1 unua premio de 300 svisaj frankoj.

1 dua premio de 250 svisaj frankoj.

2 triaj premioj po 200 svisaj frankoj.

8 kvinaj premioj de kuraĝigo po 50 svisaj frankoj.

50 honoraj medaloj.

b) Gejunuloj (Seniors) :

1 unua premio de 300 svisaj frankoj.

1 dua premio de 250 svisaj frankoj.

2 triaj premioj po 200 svisaj frankoj.

2 kvaraj premioj po 100 svisaj frankoj.

7 kvinaj premioj de kuraĝigo po 50 svisaj frankoj.

10 abonoj al la « Ekumena Pres- kaj inform-Servo ».

50 honoraj medaloj.

Krom tio la konkurantoj, kies verkajo akiros la mezvaloron, ricevos honoran mencion.

Rajtas partopreni en la konkurso la genuloj de la tuta mondo, kondiĉe, ke ili estu naskitaj :

Antaŭ la 1-a de Januaro 1927 kaj post la 31-a de Decembro 1922 (por la sekcio de la gejunuletoj).

Antaŭ la 1-a de Januaro 1923 kaj post la 31-a de Decembro 1918 (por la sekcio de la gejunuloj).

La manuskriptoj ne eldonitaj ĝis nun devas enhavi ne malpli ol 1000 vortojn nek pli ol 2200, kaj esti redaktataj en kiu ajn lingvo. La organizantoj insistas por ke la Esperantistaro profitu de tiu ĉi okazo por pruvi la valoron de la internacia uzebleco de la mondlingvo.

La Ekumena Junularo Komisiono (52 rue des Pâquis, Genevo) sendos senpage laŭ peto la kompletan regularon de la konkurso en Esperanto.

LA FAMILIO ZAMENHOF. — Laŭ ricevitaj informoj la familio Zamenhof en German-Polujo estas arestita. Pluaj detaloj mankas momente.




Por ĉiu bona solvo ni notas unu poeton. 10 poentoj rajtigas al premio de 5 fr. Por ĉiu solvo uzu apartan folion, gliu sur ilin la koncernen konkursskuponon kaj indiku klare legeble vian nomon kaj adreson. La difinoj kun (R) estas radikvortoj. La solvoj estu sendataj antaŭ la 5a Majo rekte al S-ano Ferd. VOLDERS, Twee Nethenstraat 46, Antwerpen.

ATENTO ! NOVA PREMIOSSISTEMO !

Por alkuraĝigi la serĉemulojn, la Ligestraro decidis doni acetkuponon de 5 fr. por ĉiuj dek poentoj. Mi do petas la solvistojn sciigi al mi, ĉu ili volas jam havi la akiritajn premiojn, aŭ ĉu ili ŝatas ĝis kiam ili meritas plivaloran premion. De nun mi publikigos ĉiumonate, TRI problemojn. Tiamaniere la bonaj solvistoj pli rapide estos rekompencataj.

PROBLEMO No 97.

PAPILIO. KRUCVORTO.



HORIZONTALA : 1. nutraĵo (R); ĉasputoro (R). — 2. juĝo; pagileto. — 3. unuo de elektra kontraŭstaro (R); plata pilkojetilo (R); havigu al vi; kantado (R). — 4. kamaradino (R); prefikso; fano; kavaleriisto (R). — 5. Parteto; vibri (R); pantalonrimeno (R); amfibio (R). — 6. spico (R); lirika kanteto (R); monspeco; malsama (R). — 7. altranga persono (R); foriri (R); vivneceseco; arbo. — 8. korpparto (R); komenci boatveturigon; terenoj ekster la urbo (R); konjunkcio. — 9. speco de nukso (adj.) telero. — 10. opinio; fari (R); artikolo; skrapo la kampon. — 11. marŝi (R); enpaki (R); okokula besteto (R); inverso de ago (R). — 12. triangula insulo formita de disbranĉigo de rivero ĉe ĝia enfluo en la maron (R); ŝtonpresarto (R). — 13. malsano (R); trinkaĵo; daŭro; planto. — 14. gasa; denove pretigi rajdĉevalon (R). — 15. birdo (R); subtera fungo (R). — 16. imperiestro (R); ŝategi. — 17. parto de frazo; konstrumaterialo. — 18. sufikso; metalo (R).

VERTIKALE : 1. ekkrio. — 3. esperigi (R). — 4. ŝiparestro. — 5. pers. pron.; korpparto (R); dependiga konjunkcio. — 6. Laŭte voki (R); sufikso Egipta Sundio (R). — 7. speco de biciklo (R); mitologia figuro. — 8. numeralo; haŭta kavo kun aero (R.). — 9. ekzisti (R); ŝanĝo; inklino; fiksita al la masto (R). — 10. planedo; konjunkcio; utilaj bestetoj. — 11. lando en Eŭropo (R); membraro (R). — 12. juna birdo (R); nenatura. — 13. malkuraĝiĝi (R); planto (R). — 14. produkto de la kampo. — 15. hodiaŭa. — 16. virinnomo; monro de gajeco (R). — 17. ŝildo; rodulo. — 18. flugmaŝino; likvoro. — 19. granda birdo; du samaj vokaloj; fiŝo. — 20. birdo (R); birdo (R); gento (R); regula aranĝo (R). — 21. pers. pron.; parteto de korpo aŭ maŝino. — 22. komandi; armilo (R). — 23. ne pli ol; numeralo; nedifinita afero. — 24. mitologia persono (R); birdo (R); flanko de konstruaĵo (R). — 25. birdoj. — 26. rehavigi. — sufikso.

PROBLEMO No 98.

LETERPROBLEMO (ensendis S-ro Iserentant).

La tuta frazo ekzistas el 37 laŭorde sinsekvantaj literoj, kaj formas konatan proverbon.

- 17 — 22 — 5 — 7 — 31. Likvoro.
- 11 — 4 — 12 — 24 — 18 — 6. Ornamento de kelkaj birdoj.
- 19 — 21 — 36 — 1. Brando (R).
- 30 — 3 — 32. Insekto (R).
- 14 — 13 — 37 — 8 — 15 — 16. Kelkope.
- 25 — 2 — 17 — 8 — 28 — 22. Birdo (R).
- 9 — 29 — 26 — 27. Gaso (R).
- 35 — 26 — 12 — 23. Lumigilo (R.).
- 20 — 33 — 10. Prepozicio kaj prefikso.
- 37 — 29 — 34 — 36 — 32. Greno (R).

PROBLEMO No 99.

KALKULPROBLEMO.

Farmisto Grandov, pasitan semajnon, venis al la urbo por forvendi siajn belajn, freŝajn ovojn. Al la unua kliento, li sukcesis forvendi la duonan de la tuta kvanto plus duonan ovon. De la restajo alia kliento aĉetis la trionon plus trionan ovon. De la nun restantaj ovojn li donis al sia bofratino, kiun li pasante vizitis, la kvaronon plus kvaronon de ovo. Tuj poste li forvendis de la restajo la kvinonon plus kvinonon de ovo. La sep lastaj klientoj, kiujn li vizitis ĉiuj demandis saman kvanton da ovojn. Se oni scias ke Paĉjo Grandov forvendis ĉiujn siajn ovojn, kaj rompis eĉ ne unu ovon, kiu tiam diros al mi, kiom da ovojn la farmisto almenaŭ kunportis?


SOLVO DE LA ANTAŬAJ PROBLEMOJ.

PROBLEMO 89. — PEONIO — LOTUSO — DIANTO — ENANTO.

Bone solvis : Ges. POLLET; D'HONDT; COUWENBERG; VAN MULLEM kaj PITTOORS. Multaj ne trovis la kvaran floron.

PROBLEMO 90. — ARAKO — BRAKO — FRAKO — KRAKO.

Bone solvis : Ges. TOP; POLLET; KEVERYN; D'HONDT; ISERENTANT; COUWENBERG; VAN MULLEM; PITTOORS; VAN DER MAST; VAN TUYKOM.



W. H. B., Bruselo. — Koran dankon por la kunlaboro. Kiel vi povos konstati mi uzos la kontribuojn. Ĉi tion monston ne eblas.

Sold. J. K. — Dankon por via afabla letero. Mi esperas baldaŭ ricevi de vi pluan novaĵon. Plej sincerajn amikaĵojn.

Sold. K. S. — Mi transdonos vian peton. Sed notu ke la mobilizitaj membroj devas pagi la lig-kotizon. Sen tio oni ne povas sendi la revuon.

F. V. A. — Mi memoros vian kritikon.

FLANDRA ESPERANTO-INSTITUTO

(Vereeniging zonder Winstoogmerken.

Staatsblad 20-12-1930. Akte 1227)

P. Van Humbeekstraat 3, BRUSSEL-WEST.

Postcheck : 3268.51

Fundamentaj Verkoj de Esperanto

Superflue estas rekomendi la verkojn de D-ro Zamenhof. La stilo de la Majstro estas, pro sia ĝusteco kaj internacieco, imitinda ekzemplo. Bedaŭrinda estas, ke la nuna esperantista generacio ne sufiĉe konas la fundamentajn verkojn. Pri tio skribis Akademiano, D-ro Corret :

« Ĉiu Esperantisto devus ĉiutage legi kaj studi kun la plej granda atento almenaŭ unu paĝon el la verkoj de Zamenhof. Se ni sekvus tiun bonegan konsilon, la ĝenerala kono de nia lingvo estus pli granda, nia stilo fariĝus internacie pli bone komprenebla pro lernado el la sama fonto.

» Dangere estus, se la studado de la verkoj de la Majstro estus iom post iom forlasita por preferi studi laŭmodajn verkojn de malpli fidindaj aŭtoroj.

» Oni memoru, ke Esperanto povas utili, nur se ĝi estas lingvo vere internacia kiu posedas unuecon. Tiu unueco povas ekzisti, nur se ĝi apogigas sur firma fundamento. Tiu fundamento nur povas esti la verkoj de nia porĉiama Majstro D-ro L. L. Zamenhof. »

Al la verkoj de L. L. Zamenhof ĉiu el ni rezervu do honoran lokon en sia biblioteko; despli, ĉar — eldonitaj grandkvante — iliaj prezoj estas eksterordinare malaltaj!

FUNDAMENTO DE ESPERANTO (11 × 17 cm., 112 p.).

La fundamento de la lingvo kaj la gvida dokumento por ĉiu bona Esperantisto! ... fr. 5,00

FUNDAMENTO KRESTOMATIO (12 × 19 cm., 460 p.).

Post « Fundamento de Esperanto » la plej grava verko. Zorga gradigo faciligas ĝian legadon ... fr. 18,00

LINGVAJ RESPONDOJ (15,5 × 21 cm., 116 p.).

Interesaj klarigoj de gramatikaj aŭ lingvaj demandoj, plej kompetente donitaj de Zamenhof mem ... fr. 6,00

PROVERBARO ESPERANTA (15,5 × 21 cm., 82 p.).

Kvintesenco de la proverboj de ĉiuj nacioj. Esperanto havu siajn proprajn proverbojn! ... fr. 6,00

FABELOJ DE ANDERSEN (15,5 × 21 cm., du vol. : 156 + 156 p.).

Specialan zorgon dediĉis nia Majstro al la traduko de la mondkonataj fabeloj de Andersen ... fr. 15,00

GEORGO DANDIN (15,5 × 21 cm., 52 p.).

Verko de la mondfama Molière tradukita en lingvo simpla, konciza kaj klara, laŭ la originala modelo ... fr. 3,00

LA RABENO DE BAĤARAH kaj LA GIMNAZIO (15,5 × 21 cm., 68 p.).

Novelo de Heinrich Heine kaj monologo de Salom Alejhem kiuj skizas la malfacilan vivon de Judoj ... fr. 4,00

IFIGENIO EN TAŬRIDO (15,5 × 21 cm., 108 p.).

Tragedio de la plej fama germana poeto : Goethe. Kvankam en versoj, la traduko estas facile komprenebla ... fr. 6,00

MARTA (15,5 × 21 cm., 240 p.).

Romano de la fama pola literaturistino Eliza. Orzeszko, elokventa pledo por la virino ... fr. 15,00

(Daŭrigo sur la kvara kovertpaĝo.)

←	KUPONO por la 97a PROBLEMO	KUPONO por la 98a PROBLEMO	KUPONO por la 99a PROBLEMO
---	----------------------------------	----------------------------------	----------------------------------

OOSTENDE

« Reĝino de Flandra marbordo »

HOTEL METROPOLE

Kerkstraat 32

75 KOMFORTAJ ĈAMBROJ
kun fluanta akvo,
varma kaj malvarma

Centra hejtado. Litto. Aŭtomobilejo.

Kuirejo kaj kelo bonreputaciaj.

MODERAJ PREZOJ

S-ano SNYKERS
havas la plej bonajn rekomendojn
kaj persone direktadas.

DRUKKERIJ H. & H. BRAEKEVELT

ALLE DRUKWERKEN VOOR HANDEL, VEREENIGING
& FAMILIE (ROUW) ● IMMER KEURIG DRUKWERK
AUTOMAAT-INRICHTING VOOR GROOTE OPLAGEN

STATIEDREEF, 177 (TEL. 1080) ROESELARE

LA GRANDA FAMILIO MONATA GAZETO, Grandformato

Jara abonprezo : fr. 25.—

Peranto : J. VAN AS. Pk. 4227.84
Dambrugestraat 46, Antwerpen

HERBERG

't VLAAMSCH HUIS

GROOTE MARKT 16, BRUSSEL

BONGUSTAJ TRINKAJOJ

Flandre agrabla atmosfero
Diversaj salonoj por societoj

Ejo de N. E. L. E.
(SEKCIO BRUSSEL DE FL. L. E.)

LA FARAONO

Romano de PRUS

el pola lingvo tradukis D-ro KABE
3 VOLUMOJ! Kune 625 paĝoj!

Pasie interesa romano.
La traduko estas majstroverko de
nia granda Esperanto-stilisto.

35 fr.

Flandra Esperanto-Instituto
P. Van Humbeekstr. 3, Brussel-W.

Café Nieuwe Carnot

FRANS NEEFS-D'HELDT
Carnotstraat 70 Antwerpen

PLEJ BONAJ TRINKAJOJ
Salonoj por societoj
Malvarmaj manĝaĵoj
Bonega servado

EJO DE :
Flandrema Grupo Esperantista
(SEKCIO ANTWERPEN DE FL. L. E.)

(Daŭrige de la tria kovertpaĝo.)

HAMLETO (12 × 19 cm., 176 p.).

Vere majstra traduko de la granda tragedio en kvin aktoj de William
Shakespeare fr. 5,00

LA RABISTOJ (15,5 × 21 cm., 144 p.).

Teatraĵo de Schiller, satiro kontraŭ la Socio. Traduko vigla, jafaje
kruda — kiel la originalo fr. 8,00

LA REVIZORO (15,5 × 21 cm., 100 p.).

Gaja komedio de Gogol kiu verkis ruse. Traduko lerte konciza; plej
agrabla legaĵo fr. 6,00

LA TUTA SERIO AFRANKITE : 95 Fr. !